

Babilado kun Claude Piron pri kontaktoj kun ĉinaj esperantistoj

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986 decembro

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-183/Radiokasedo-183-24-86-B-1144-Claude-GACOND-Babilado-kun-Claude-Piron-pri-kontaktoj-kun-ĉinaj-esperantistoj.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ Claude GACOND parolas kun Claude PIRON, kiun multaj konas sub la pseŭdonomo Johán Valano.

Fakte, Claude Piron, vi iris al la Pekina Universala Kongreso, ĉu ne? Sed antaŭ ol vi foriris, vi iom esprimis certan timon pri nesukceso de tiu kongreso. Kial ?

CP.- Do, fakte mi timis same kiel multaj esperantistoj timis antaŭ la kongreso en Bulonjo sur Maro. Ĉar, vi memoras ke tiutempe ĉiuj lingvistoj diris, ke pro la malsamaj prononcoj la diversaj esperantistoj ne interkompreniĝos. Kaj, konante la sonsistemon de la ĉina lingvo, kaj ankaŭ sufiĉe bone ĝian gramatikon, mi min demandis, ĉu ne okazos multege da elreviĝo en la okcidentaj esperantistoj, kiuj eble konstatus, ke ili ne kapablas lingve interrilati kun la ĉinaj.

Cl.- Kaj vi revenis...

CP.- ...optimisma. Mi revenis konvinkita ke tiu problemo estas, .. ĝi ekzistas tamen iomete, sed ĝi estas minimuma.

Cl.- Kaj do vi interesiĝis pri tiu ĉina afero, ĉar fakte vi lernis la ĉinan, ĉu ne ? Kiel ?

CP.- Ho, estas malfacile diri, kiel mi lernis ĝin. Mi eklernis ĝin multfoje, multfoje rezignis, sed ĉiam post kelkaj monatoj aŭ jaroj rekomencis, do finfine mi atingis sufiĉe bonan nivelon, ĉar mi ricevis la diplomon de la Unuiĝintaj Nacioj pri la ĉina lingvo, kiam mi estis tradukisto en UN en Novjorko.

Cl.- Kaj estis via unua kontakto kun la reala ĉinlando, ĉu ne, ĉar antaŭe vi estis en Hongkongo kaj tiuj aliaj, sed nun en Ĉinio mem.

CP.- Efektive, mi neniam estis antaŭe en la Ĉina Popola Respubliko. Mi estis en Tajvano, Hongkongo, Singapuro, kiu estas 80%-e ĉina urbo, sed neniam estis en la komunisma Ĉinio.

Cl.- Kaj nun do ni iom vidu pri tiuj kontaktoj, kiujn vi havis do ĉefe kun ĉinparolantaj esperantistoj, kio estis via vojaĝo ?

CP.- Antaŭ la kongreso mi partoprenis kun grupo da cent esperantistoj pli malpli en vojaĝo, kiu kondukis nin, post la alveno al Pekino, al Ksian kaj poste al Nankino. De Nankino ni iris al urbeto nomata Jangĉo, revenis de Jangĉo al Nankino kaj de tie al Pekino. Entute unusemajna veturado.

Cl.- Kaj tie vi havis kontaktojn kun esperantistoj.

CP.- Jes, la unuaj kontaktoj kompreneble estis kun la ĉinaj esperantlingvaj interpretistoj, kiuj gvidis la vojaĝon, sed jam en Ksian ni havis la okazon renkonti lokajn esperantistojn.

Cl.- Kaj tiu kontakto estis facila

CP.- Sufiĉe facila, kvankam la vespera aranĝo ne estis tiel bona. Ni sidis ĉe rondaj tabloj por manĝi kaj post la manĝo venis la lokaj esperantistoj.

Cl.- kaj ili ne plu havis sidlokojn

CP.- jes ja, ni tamen havigis al ili seĝojn, sed hazarde tiu aŭ tiu alia persono venis al tiu aŭ alia tablo, kaj ni do ne povis interrilati elektante nian interparolanton, kiel ni farus, se ni starus, ni starus ĉe bufedo, kun la bufeda sistemo.

Cl.- Do tion oni devas bone memori kiam oni aranĝas kontaktojn. Jes, estas fakto.

CP.- Krome estis tre laŭta muziko, kiu malhelpis la konversaciojn, despli ke, kiel mi diris, tamen multaj ĉinoj estis komencantoj kaj tie mia, miaj antaŭaj timoj iom realiĝis. La prononco kelkfoje ne estis tre komprenebla.

Cl.- Do, kio estas la malfacilaĵo por ĉina komencanto en esperanto?

CP.- Do, la plimulto el niaj sonoj ne ekzistas en la ĉina lingvo. Pri la konsonantoj uzataj memstare, tio ne ĝenas. Sed, kio estas tre malfacila por ili, estas kiam pluraj konsonantoj retroviĝas kune. Ekzemple vorto kiel 'ekskludi', tiu 'kskl'-sono estas tre malfacile elparolebla.

Cl.- Do kiel ili prononcas ĝin ?

CP.- Ĝenerale : 'eskrudi'. Tre ofte la 'l' post konsonanto fariĝas 'r'. Dum la 'r' fariĝas 'l', se ĝi estas intervokala.

Cl.- Kaj verŝajne en la kursoj ili devas alfronti tiujn ekzercojn, sed tiuj kiuj praktikas esperanton eĉ sen kontakto kun fremdlando de kelkaj jaroj solvas tiujn prononcojn, problemojn ?

CP.- Ŝajnas al mi ke jes. Ĉar ni renkontis kelkajn tre izolitajn esperantistojn, mi pensas ĉefe pri iu kamparano, kiu vivas kiel sola esperantisto 100 kilometrojn for de Ksian kaj venis tien al la klubo ĉar li eksciis ke alvenas tuta karavano da diverslandaj esperantistoj. Ni estis cent homoj el trideko da landoj, se mi bone memoras, kaj tia homo parolis sufiĉe klare. Multaj ĉinoj, esperantistoj kiujn mi renkontis, fakte parolis perfekte, tre bone, kaj kun ege bona prononco. Sed tiam, ĉiufoje ili estis homoj, kiuj lernis antaŭ, mi diru, pli ol kvin jaroj.

Cl.- Kaj ĝenerale tiuj esperantistoj havis la unuan kontakton, eĉ la kvinjaraj, kun ne-ĉinoj ?

CP.- Jes, jes. Eĉ tiuj, kiuj lernis antaŭ dudek aŭ tridek jaroj, neniam havis okazon interparoli kun fremdlanda esperantisto. Do por ili estis vere tre grava okazaĵo.

Cl.- Sukcesa eksperimento, ĉu ne ?

CP.- Tute sukcesa.

Cl.- Ni dediĉos la venontsemajnan elsendon al, ni diru, la similecoj kaj malsimilecoj inter esperanto kaj la ĉina. Sed hodiaŭ ni daŭrigu vian vojaĝon, do, post tiu renkontiĝo, kie vi ne povis stari, sed sidi, post tiu kontakto kun kamparano, kiaj aliaj kontaktoj estis ?

CP.- Do en Nankino la aranĝo estis tute alia kaj multe pli praktika, multe pli oportuna por interparoli. Tie ni estis akceptitaj de la Nankina esperantistaro, post vizito al la Sun-jat-sen-monumento, kaj ni povis babili tre agrable kun aro da esperantistoj, preskaŭ ĉiuj laboristoj, kaj kelkaj komencantoj, kelkaj malpli komencantaj lingvolernantoj kaj la rilato estis tre agrabla, profunda.

Cl.- Kiaj profesioj ? Vi diras ‘laboristoj’..

CP.- Do, ekzemple estis iu knabino, kiu laboris en elektra ventumil-fabriko. Alia estis maristo sur la Jangce-rivero. Li prizorgis la ŝipojn inter Nankino kaj Vuhan. Tria laboris en aŭtomobil-fabriko. Tiaj homoj.

Cl.- Do ne intelektuloj.

CP.- Ne intelektuloj.

Cl.- Kaj la gvidantoj dum tiuj semajnoj, tiuj du semajnoj, kiuj gvidis vin. Ĉu ili estis normalaj gvidantoj aŭ estis esperantistoj dungitaj ?

CP.- Jes, ili estis esperantistoj portempe dungitaj por gvidi esperantistojn dum la antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj. Kaj ili apartenis al diversaj profesioj, sed preskaŭ ĉiuj estis intelektuloj, fakte.

Cl.- Kaj facile esprimiĝis ?

CP.- Dependis. Kelkaj treege bone, alia ne. Ni havis unu, kiu ĝenerale fuŝis la finaĵojn, sed ni tamen lin komprenis perfekte.

Cl.- jes, ĉar la redundanco estas jam nur helpo, ĉu ne ? Jes, bone. Kaj do vi, ĉu vi sentis malhelpon en la kontaktoj, ke kelkaj volis veni kaj ne facile povis kontakti vin.

CP.- Jes, tio okazis, verŝajne pro politikaj kaŭzoj, ĉu ne? Oni diris, ke ili estis selektitaj laŭ lingvaj kriterioj, sed laŭ mia kompreno tio ne estis plene ĝusta. Kelkaj estis eliminataj, ĉar ili ne plaĉis al la ĝusta persono.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon ni daŭrigos nian babiladon kun Claude Piron pri la Universala Kongreso en Pekino. Ĝis reaŭdo!